

Eseo pri Ido de Tazio Carlevaro,
la 5-a kajero de la kolekto Studoj de Kultura Centro Esperantista
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 703, 1977.03.30 & 04.01 & 02

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. La 50-paĝa Eseo pri Ido, kiun Tazio Carlevaro publikigis kiel 5-a kajero de la kolekto 'Studoj' de Kultura Centro Esperantista, rapide disvendiĝas. Tio plian fojon atestas la intereson de la esperantistaro por prilingvaj temoj, kaj interalie por rekte interlinvistikaj studoj.

A.- Tazio Carlevaro, kuracisto ekde 1972, kaj specialiĝanto pri psikiatrio, lernis Idon kaj Esperanton preskaŭ samtempe en 1957. En 1960 li lernis Interlinguan kaj Occidental. Li multe verkas en esperantaj kaj alilingvaj periodaĵoj pri planlingvistiko, psikolingvistiko, literaturo. Li ankaŭ verkas en Ido kaj eĉ en Interlingua kaj Occidental. Lin mondfamigis lia priliteratura kontribuaĵo al la enciklopedieto Esperanto en Perspektivo aperinta en 1974. Li estas rilate al la kvar naciaj lingvoj de Svislando eksterordinara poligloto, ĉar ĉiujn kvar li flue parolas, inkluzive plurajn dialektojn. Li naskiĝis en 1945 en la itallingva kanto de Svislando, Tiĉino, longe studis en la germanlingva urbo Zürich kaj nun loĝas en la franclingva parto de Svislando, en la kanto Neuchâtel, kie li prezidas konsultan komitaton de la interlingvistika arkivejo CDELI (Centre de documentation et d'étude sur la langue internationale) en la Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds, kaj eldonprizorgas por la kolekto Studoj de Kultura Centro Esperantista, en kiu ĝuste aperis la kajero Eseo pri Ido.

Cl.- Ni ne opinias troigi dirante, ke tiu ĉi eseo estas mejloŝtono en la pri-Ida esperantoliteraturo. Ĝis nun tiu ĉi literaturo restis polemika kaj ege subjektiva. Por la unua fojo aperas objektiva studo. Historia skizo pri Ido alportas sciigojn pri la tumulta naskiĝo de Ido kaj pri la iom post ioma maljuniĝo de tiu ĉi movado, kiu foje timige konkurencis Esperanton.

A.- Tute certe la ĉapitro pri Ido-fonetiko estos utila ne nur por la esplorantoj de Ido, sed ankaŭ por la analizantoj de Esperanto, ĉar la du lingvoj ne multe malsimilas, kaj ĉar pri la diverĝoj multe raportas la aŭtoro. Ankaŭ la postaj ĉapitroj dediĉitaj al la Ido-ortografio, al formalaj konsideroj, al la strukturo de la frazo kaj al rilatoj inter frazoj, al la fermitaj mikrosistemoj de la korelativoj, de la personaj pronomoj, de la numeraloj kaj verbkonjugacio, per la komparoj inter ambaŭ lingvoj ne nur malkovrigas, kio fakte estas Ido, sed ankaŭ en kio ĝi diferencas de Esperanto. La ĉapitro pri la derivado kondukas la leganton konstati, ke Ido fakte rezignis pri vortformadaj ebloj daŭre ekzistantaj en esperanto, kiuj ligas esperanton al neokcidentaj lingvoj.

Cl.- La studo finiĝas pri rapida prezento de la Ido-literaturo. Estas interese citadi el tiu eseoparto.

A.- « Apud Esperanto, Ido estas la sola planlingvo, en kiu ekzistas originala beletra literaturo. Sed kreo de literaturo en Ido ne estis memkomprenebla afero. Pluraj Ido-pioniroj pli malpli konstruistis ĉi-emon, ĉu per konsiloj okupiĝi pri io pli fruktodona por la lingvo, ĉu per ridindigo de la jam tiam fariĝanta esperanta literaturo. Paolo Lusana apartenis al tiu ĉi lasta kategorio. Louis Couturat al la unua.

Cl.- De Beaufront, kun aliaj, inter alie kuin la Ido-klerulo Marcel Pesch, havis tiurilate esence pragmatikan sintenon : oni ja kreu beletristikon kun la celo demonstri, ke Ido ja povas ĉion esprimi. Sed la celo de planlingvo, laŭ ili, ne povis esti la pretiĝo al literatura uzo.

A.- Tamen kelkaj aŭtoroj, nepriatentante la ĝeneralan negativan sintenon de la oficiala Ido-movado, jam komencis verki. Nature, ĉefe komence, iliaj verkoj tre similis al la verkoj de la Esperantaj aŭtoroj de la unua periodo, la formaj kaj enhavaj mallertaĵoj preskaŭ samas.

Cl.- Tre kurioze, ne okazis influo de la esperanta al la nove burĝonanta Ido-literaturo. Tial, ankaŭ dum la florado de la literatura skolo ĉirkaŭ la periodaĵo Literatura Mondo, la Ido-aŭtoroj daŭre verkis per relative primitivaj teknikoj. » Fino de la citaĵo.

A.- Tio montras, ke post la unua mondmilito veraj rilatoj ne ekzistis plu inter la Ido- kaj Esperanto-socioj.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), junio 2012*